

# La letero de l' Akademio de Esperanto

Nº 10 — Januaro - Februaro - Marto 1990

ISSN 0986-1181



1989: la popoloj kaj registaroj de orienta Eŭropo ŝanĝis la nomojn de siaj ŝtatoj. La landnomoj ne ŝanĝiĝis: la Akademio prave konsideris nur ties elementojn. Nun ĉiu povas mem kunmeti la aktualajn nomojn...

1934: la Persa registaro eksentas fortan malplaĉon por la nenacia sed monde internacia nomo Persio; ĝi do draste devigas la popolojn de la mondo ĝin renomi Irano, laŭ la tradicia enlanda nomo.

Ĝis hodiaŭ neniu dogmulo levigis por rimarkigi, ke ĉar la naturo de la lando restis la sama ("unu lando, unu lingvo, unu historio"), do oni devas apliki la sufikson -io (aŭ ujo) al Irano, same kiel oni delonge aplikis ĝin al Persio aŭ Persujo.

1984: ne kontentaj, post laŭdire sepdek-jara enlanda uzado, pri la nula disvastigiteco de sia misformita uj-nomo, la dogmuloj, mastroj de la Koreanoj-Esperantistoj trudis dekreton, spite al la etimologio en sia propra lingvo, spite al la monda internacieco: ili faras ĉion por trudi sian dogmon al la monda movado, al tri homoj el kvar sur nia planedo, kiuj de ĉiam diras nur \* KORE- en ĉiuj lingvoj kaj KOREO en Esperanto!

Klimakse, eĉ komercan kaj pagatan reklamadon ili uzas por trafi sian miscelon: per tio ili montras sian nefidon al malprava nomo!. Sed la faktoj restas: niaj koreaj amikoj laboras kontraŭ si mem, ĉar ĉiuj Koreanoj, Esperantistoj aŭ ne, perfekte scias, ke la nunaj Esperantistaj ĉefoj en Koreo malpravas konservi tian misnomon kun neĝuste uzata sufikso -uj.

1989: la Akademio troviĝis antaŭ du formoj en uzado: ĝi prave elektis tiun, kiun ĝia statuto kaj ĝiaj pli fruaj decidoj faris al ĝi devon elekti. Ĝi faris sian moralan kaj statutan devon.

KOREO estas monde internacia; ĝi ne malplaĉas al la Korea registaro kiu eĉ allasas ĝin sur siaj poŝtmarkoj sub la Angla formo KOREA; ĝi do ne estas preta agi kiel la iama Persa registaro, kvankam ĝi mem nomas la landon Hanguk ("Hanlando"=Suda Koreo). La Nord-Koreanoj dume nomas sian landon Chosön ("Ĉoseno"= Norda Koreo).

Sekve la Esperantistoj ne nur rajtas, sed eĉ devas, uzadi la formon KOREO konata de almenaŭ tri Teranoj el kvar; ĝi estas uzata de almenaŭ 85 jaroj de Esperantistoj el la tuta mondo.

Almenaŭ estu tiel en nia demokrata lingvo: ne minoritato, des pli malprava minoritato faros leĝon por la tuta mondo. Ne asocio, eĉ Korea, rajtas modifi la internacian nomon de sia lando; des malpli ĝin misforme malbonigi spite al la fundamentaj principoj de la lingvo. En 1984, UEA-redakcio nur deziris komplezi al sia kliento; sed per tio ĝi malsprite forvendis la lingvon al dogmuloj. Historio riproĉos tiun mispaŝon al ĝi. Plie la redakcio kontraŭstatute agas kiel la iamaj caraj cenzuristoj. Fi!

Kleraj esperantistoj ne lasos sin impresi per tiaj misagoj, kiuj endanĝerigas la fundamentajn principojn de nia lingvo; finfine, ili per sia kuraĝo servos la Korean movadon mem kaj la venonta juna generacio de Koreanoj-Esperantistoj ilin kolektive dankos por sia klar-

.../...

# OFICIALAJ INFORMOJ de la AKADEMIO de ESPERANTO

## Sendependa lingvo-institucio fondita de D-ro L.L. ZAMENHOF en 1905

N°12 (Oktobro 1989)

### REZULTOJ de la BALOTADO pri la ESTRARO kaj pri kelkaj DIREKTOROJ:

Speciala kunveno de la "Amikoj de l'Akademio" estis kunvokita en Parizo la 1-an de Oktobro por kontroli la balotojn. El la protokolo de la kunveno rezultas jeno:

#### Estraro por la periodo 1989-1992: estis elektitaj

per 30 voĉoj, 2 ne, 1 sindetene, Jean THIERRY (Sekretario);  
per 30 voĉoj, 1 ne, 2 sindetene, D-ro Werner BORMANN (Vic-prezidanto);  
per 24 voĉoj, 3 ne, 5 sindetene, Violin OLJANOV (Vic-prezidanto);  
per 29 voĉoj, 2 ne, 2 sindetene, D-ro André ALBAULT (Prezidanto).

#### Direktoroj por la periodo 1989-1992: estis elektitaj

##### Direktoroj de Sekcioj:

per 26 voĉoj, 1 ne, 6 sindetene, Bernard GOLDEN (Ĝenerala Vortaro);  
per 26 voĉoj, 2 ne, 6 sindetene, Rüdiger EICHHOLZ (Fakaj vortaroj);  
per 26 voĉoj, 1 ne, 6 sindetene, Geraldo MATTOS (Prononcado);

##### Direktoro de Komisiono:

per 29 voĉoj, 1 ne, 3 sindetene, Carl STØP-BOWITZ (Aprobo de Terminaroj).

Nun okazas aliaj balotoj por du aliaj sekcioj (Gramatiko kaj Literaturo) kaj por du aliaj Komisionoj: unu malnova (Landaj Esperanto-Institutoj kaj Akademio), kiu supervidos la ekzamenojn en mondaj kadroj, kaj unu nova (Esperanto kaj Informadiko), kiu prizorgos pri mondaj informadikaj normoj por niaj dekdu specifaj supersignaj literoj.

Por la Akademio, ties Prezidanto,  
D-ro André ALBAULT

\*\*\*\*\*

N°13 (Januaro 1990)

### REZULTOJ de la KOMPLEMENTA BALOTADO de kvar pliaj DIREKTOROJ:

Kiel kutime, la "Amikoj de l'Akademio de Esperanto" en la Pariza regiono kunvenis por realigi la kontroladon de la balotado. Tio okazis la 7-an de Januaro 1990. Ili konstatis, ke voĉdonis 30 membroj de la Akademio. Sekve, validis la regulo de la du trionoj: por esti elektita Direktoro, necesis kaj sufiĉis ricevi la absolutan plimulton de la voĉdonintoj.

La kvar kandidatoj estas (re)elektitaj; ili estas:

Kolego DUC GONINAZ (25 jes, 2 ne, 3 sindetene): Sekcio pri Gramatiko;  
Kolego RAGNARSSON (28 jes, 1 ne, 1 sindetene): Sekcio pri literaturo;  
Kolego LO JACOMO (28 jes, 1 ne, 1 sindetene): Komisiono "Landaj Esperanto-Institutoj kaj AdE".  
Kolego SHERWOOD (28 jes, 0 ne, 2 sindetene): Komisiono "Esperanto kaj informadiko";

La Sekcioj respondecas pri ĉiuj taskoj de la AdE, sed nur koncerne al speciala lingva fako. La Pleno diskutas la raportojn de la Sekcioj kaj alprenas decidojn per voĉdonado (Art.16, Art.20/23).

.../...

La Komisiono plenumas aliajn taskojn ol la pure lingvajn; ili povas inviti al kunlaboro eĉ specialistojn el ekster la AdE. La Pleno aprobas la celon kaj funkciadon de difinita Komisiono kaj estas informita pri ties agado per specialaj raportoj. (Art.17).

Por la Akademio, ties Prezidanto  
D-ro André ALBAULT

REPRESO DE LA OFICIALAJ INFORMOJ DE LA AKADEMIO PETATA.

## **KRONIKO de la NUNTEMPO**

### **PRI TRANĈADO DE VORTOJ**

(Responde al Renée Triolle).

1) Mi persone tranĉas: fik-anto kaj grat-ulo, sed temas nur pri persona ŝato.

2) En la franca lingvo, mi verkis komputilan programon, tre simplan, kiu relative bone tranĉas la vortojn, inter la silaboj; tamen ĝi ne obeas ĉiujn regulojn: ĝi malĝuste tranĉus "moyenâgeux", sed ankaŭ "LE ROBERT METHODIQUE" 1983 malĝuste tranĉas ĝin. Specialistoj pri vorttranĉado difinas liston de pluraj centoj (eĉ miloj) de litergrupoj ene de kiuj tranĉo eblas aŭ ne eblas en tiu pozicio kun tioma prioritato; pli fortaj prioritatoj nuligas pli malfortajn. Persone mi opinias, ke tia sistemo estas tro peza por la franca lingvo. Kaj ankaŭ pri la reguloj oni povas diskuti: por mi estas relative grave, ke estu minimume 4 literoj ambaŭflanke de la tranĉo tiel, ke multajn tranĉojn, kiujn proponas ekzemple WORD 3 (teksto-prilabora programo), mi rifuzas, eĉ se ili teorie estas ĝustaj.

3) En Esperanto la problemo estas pli komplika ol en la franca lingvo, kaj komputilajn programojn, kiuj ĝuste tranĉas la Esperantajn vortojn, mi ne konas, kaj mi ne sukcesis verki: eĉ se la programo kapablus "kompreni" la tekston, ĝi ne sukcesus solvi la ambiguan sent-ema/sen-tema (iama numero de Kontakto vortludis precize pri tiu ambiguo). Laŭ mia scio nunaj eldonistoj, tranĉas ĉu ie ajn, ĉu laŭ nacilingvaj reguloj, kiuj ne tre taŭgas por Esperanto, sed ĉiam eblas, ke relegante la artikolon oni ŝanĝu la lokon de la tranĉo. Necesas unue difini, ĉu simplaj principoj kiel "estu minimume 4 literoj ambaŭflanke de la tranĉo" tiom gravas kiel komplikaj reguloj: "ni tranĉu inter vortelementoj". Sistemo, kiu difinus centojn da litergrupoj (kiel en la franca) eblus, sed necesus kompili la koncernan liston, la sistemo mem estas relative peza, kaj ne solvas ĉiujn problemojn (ekzemple sentema). Pli simpla sistemo laŭ mi eblas, kiu estus laŭ mi pli bona ol tio, kio estas uzata de hodiaŭaj Esperanto-eldonistoj, kaj tranĉus ĝenerale inter vortelementoj, ne evitante tamen kelkajn kaptilojn kiel fik-anto kaj grat-ulo. Ĉu ŝoke? Mi ŝatus, ke la Akademia komisiono de Prof. Sherwood donu sian opinion ankaŭ pri tiu ĉi problemo, kaj ke ĝis 1991 aŭ 1992 aperu Akademia rezolucio pri tiu temo kun ekzemplo de komputila programo.

François LO JACOMO

---

(daŭrigo de la editoralo de D-ro André Albault)

*vida kompreno.*

*Ĉar tia misnomo baras la vojon al sana Esperanto-informado en Koreo apud ĉiuj kleruloj kaj inteligentaj civitanoj.*

D-ro André ALBAULT



*Sekcio pri Ĝenerala Vortaro*

## **ESPLORO PRI LA SIGNIFO KAJ UZO DE « IK » EN ESPERANTO**

### **Propono por nova projekto de la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro**

Mia atento estis altirita al tiu ĉi demando rezulte de legado de publikigitaj artikoloj kaj ankaŭ interŝanĝo de korespondaĵoj kun interesuloj. La diversaj vidpunktoj prezentotaj ĉi-sube konsistigas dornhavan problemon por ĉiuj esperantistoj, ne nur laikoj sed ankaŭ fakuloj. Estas evidente, ke ne sufiĉas la magraj klarigoj en Plena Analiza Gramatiko (PAG) kaj Plena Ilustrita Vortaro(PIV), ĉar ili ne kontentige respondas plurajn demandojn. Pro tio mi decidis, ke la sekva projekto de la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro l. estos enketo pri "ik" kun la celo formuli pli racian priskribon de ĝia signifo kaj uzo en Esperanto. Estos necese pritrakti la sekvajn punktojn:

#### 1. Klasifo kaj semantiko de "ik".

Mankas akordo inter leksikografoj kaj gramatikistoj rilate la klasifadon de "ik" kaj ties semantikan amplekson.

##### 1.1 Sufikso.

Verax 2. inkludas "-ika" en sia listo de sciencaj afiksoj sed limigas ĝian uzon kiel sufikson al la kemia nomenklaturado: "Kiam simpla ŝtofo formas nur unu anhidridon, la nomo, kiu kvalifikas tiun anhidridon (kaj la respondantan acidon) estas formita per la sufikso -ika aldonita al la radiko de la nomo de tiu ŝtofo. Ekz.: karbonika anhidrido" (pĝ.ix). Wüster 3. same registras "-ik" kiel adjektivan kemian sufikson. En Plena Vortaro (PV,1934) "-ik" ne troviĝas kiel aparta leksika ero kaj ĝi mankas en la listo de sciencaj kaj teknikaj afiksoj (pĝ12). Same ignoras "-ik" la Suplemento de PV (1954). PIV (1970) karakterizas "-ik" kiel internacian sufikson, funkciantan por formi:

1. nomon de arto aŭ tekniko
  - a) el la nomo de la persono okupiĝanta pri ĝi: poeto- poetiko; ĵurnalisto - ĵurnalistiko
  - b) el la nomo de la koncerna temo: elektrono - elektroniko; metodo - metodiko
2. nomon en la kemio de pli grandvalentaj saloj: ferika sulfato.

##### 1.2. Pseŭdosufikso

"ik" troviĝas en PIV ankaŭ kiel pseŭdosufikso en nomoj de prahistoriaj epokoj (paleolitiko, neolitiko) kaj en epitetoj difinantaj arkitekturan stilon (ionika, gotika). La sama konsultlibro difinas pseŭdosufikson jene: "Internacia vortfino, ofte devenanta el greka radiko, aŭ prezentanta nacilingvan sufikson, kiu egalvaloras la finaĵojn aŭ sufiksojn en Esperanto."

##### 1.3. Neoficiala (pseŭdo-) sufiksoido

Ankoraŭ unu modifon en la klasifo prezentas PAG (1980, §345): "Iko estas neoficiala (pseŭdo-) sufiksoido, por formi la nomon de scienco, okupiĝo ktp el la homo de la respektiva isto. Ekz-e: poeto-poetiko, stilisto-stilistiko, \*gimnasto-gimnastiko, \*mimo-mimiko." La steletoj antaŭ "gimnasto" kaj "mimo" indikas, ke la vortoj estiĝis per retroformado (vd. §3) do ili ne estis uzataj antaŭ la ekzisto de "gimnastiko" kaj "mimiko". PAG preteratentas la uzon de "-ik" en la nomoj de prahistoriaj epokoj kaj ĝian funkcion kiel adjektivan sufikson en la kemia nomenklaturado. Laŭ la difino de pseŭdosufiksoido en PAG (§ 362), ĝi estas elemento, kiu tiel ofte ripetiĝas ĉe fino de vortoj, ke ĝi ŝajnas sufiksoido. Sufiksoido (§322) diferencas de sufikso, ĉar ĝi funkcias tute same kiel la radikoj.

##### 1.4 Morfemoido

Mattos 4. (pĝ.201) enkondukas la novan terminon morfemoido por karakterizi "-ik". Morfemoidoj diferencas disde morfemoj, ĉar granda nombro apartenas al la teknika lingvo. dum morfemo ligiĝas al alia morfemo, morfemoidoj ligiĝas nur al difinitaj tipoj de vortoj.

lingv (morfemo) ist (morfemo) o  
lingvist ik (morfemoido) o

Se la morfemoido transformiĝas en morfemon, la konsisto de la vorto aliiĝos.

lingv (morfemo) ik (morfemo) o

Laŭ Mattos la morfemoido ne povas superordiĝi al vorto. "Iko" ne povas signifi sciencan fakon.

#### 1. 5. Ankoraŭ du vidpunktoj

Malovec 5. (pĝ 20) klasifas -IKO kun novaj fakaj afiksoj konsiderataj kiel neoficialaj, kiuj estas enkondukataj en Esperanton por la bezonoj de la faka stilo; ekzemple: poetiko = scienco pri poezio; informadiko = scienco pri informado. Laŭ Werner 6. (pĝ 45 kaj 47) internaciaj sufiksoj kiel "-ik" ne apartenas al radikoj de koncernaj vortoj, kvankam ili estas ofte lernataj kaj uzataj kiel unu nedisigebla tuto.

#### 2. Plivastigo de la uzo de "-ik"

Laŭ PAG (§345) "iko" estas la ekvivalento de la tria signifo de "-io", neoficiala sufikso formanta nomon de scienco, okupiĝo aŭ spirita direkto el la nomo de scienculo aŭ reprezentanto de direkto. Eblas anstataŭigi ĝin per "-io" (poetiko = \*poetio) kaj ankaŭ inverse (biologio = \*biologiko). Sed "-io" en tiu ĉi senco estas nur pseŭdosufikso, ĉar ĝi ne estas ekskluzive uzata, kaj la vidpunkto de la internacieco de la vortformoj tie ĉi pli gravas, do \*poetio" kaj \*biologiko" ne estas uzataj.

"-ik" anstataŭas ankaŭ "-ologio". En itallingva lernolibro 7. estas klarigite sur pĝ.140, ke la morfemo IK indikas studdisciplinon, branĉon de scienco, sektoron de studoj ktp. Apud la tradiciaj nomoj "sociologio" kaj "zoologio" troviĝas ankaŭ "sociiko" kaj "bestiko". Tiu tendenco speguliĝas ankaŭ en la verkoj de Rüdiger Eichholz per formoj kiel "terminiko" (= terminologio) kaj "sciiko" (= inĝenierio de sciado). Sammaniere, Akiko Nagata 8, modifas tradician lingvistikan terminologion per sia apliko de "-ik" kiel sufikso: soniko, voĉiko = fonetiko; formiko = morfologio; fraziko = frazeologio (kaj ankaŭ sintakso!); tipiko = tipologio.

Reiersø1 9. nomas "-ik" produktiva por formi nomojn de sciencoj kaj partoj de sciencoj. Li atentigas, ke en la lastaj jaroj aperas tendenco anstataŭigi la sufikson "-istiko" per "-iko" kiel en "lingviko" anstataŭ "lingvistiko". Sed en aliaj ekzemploj, kiujn li citas, la oficiala sufikso "-ist" neniam estis parto de la vorto. En "varmiko kaj "magnetiko" respektive. Reiersø1 aplikas la saman procedon al sia propra fako, la matematiko: probabliko = probablokalkulo; deriveiko, integraliko ks. Li mencias ankaŭ la same produktivan uzon de "-ik" fare de Helmar Frank por formi nomojn de sciencoj: mondikoj; substancikoj; turismiko. Alia maniero atingi la saman rezulton estas per analogio kun "poetiko" kaj "stilistiko", kiuj ŝajnas pluformitaj vortformoj surbaze de la sufikso "-ik". Pro tio Paul Neergaard proponis la vortojn "ĵurnaliko", "ĝardeniko" kaj "danciko", en kiuj "-ik" signas profesion, sed PAG (§362) opinias pli bonaj la formojn "ĵurnalistiko", "ĝardenistiko" kaj "dancistiko" laŭ la analogio de "stilisto/stilistiko" kaj "beletristo/beletristiko". Obsedata de la kunligo de la du sufiksoj "-ist" kaj "-ik", Akiko Nagata 10. malĝuste analizas la vorton "lingvistiko", interpretante

.../...



ĝin kiel "la logika scienco pri lingvistoj" (pĝ.479). Efektive, ĝi ne signifas "la iko pri la isto" sed "la iko de la isto", alivorte, lingvistiko estas la scienco, pri kiu okupiĝas lingvistoj.

### 3. Retroformado

Retroformado estas la akiro de novaj vortoj, ne per aldono de afiksoj sed per ilia subtraho, por tiel diri. Kvankam PAG ne uzas tiun terminon, ĝi priskribas la procedon en §342, RIM III. Ĉe substantivoj signifantaj sciencon aŭ similan okupon, oni povas, per forlaso de "-ik", ricevi la nomon de la koncerna persono, kiu okupiĝas pri la agado. La formulo estas: -iko minus ik=-isto. Ekzemploj estas: retoriko/retoro; GIMNASTIKO/gimnasto. Apud la retroformita nomo de la fakulo povas ekzisti ankaŭ nomo pluformita per aldono de la sufikso "-ik". Tiel, "numismato" kaj la pli peza formo "numismatik-isto" estas sinonimoj.11. Kontraŭe, malsamaj signifoj karakterizas la membrojn de la sekva paro formita surbaze de "estetiko": \*esteto=estetikulo (PIV) sed "estetikisto= filozofo specialistiĝinta pri estetiko.12.

### 4. Mistranĉoj

Retroformado ne ĉiam donas senchavan rezulton, ĉar ekzistas la risko mistranĉi vorton kun la silabo "ik" pro manko de scio pri la ĝusta etimologio aŭ pro la riproĉinda kutimo atenci la lingvon per ekstrapagancaj teorioj pri vortformado. Tiel, Karolo Piĉ 13. mistranĉas "politiko", eliminante la silabon (ne sufikson) "ik" por akiri novan vorton, "polito", al kiu li donas la signifon "komunumo"! Kvankam "botaniko" kaj "dinamiko" estas sciencoj, "ik" ne funkcias kiel sufikso; mistranĉante ilin oni ricevas "botano", kiu ne havas signifon, kaj "dinamo", kiu ne rilatas al la dinamiko sed estas elektra aparato. Same kiel tiuj du vortoj, ankaŭ aliaj nomoj de sciencoj devenas de helenaj adjektivoj finiĝantaj per ikos. PAG (§345, Rim.) atentigas pri tio sen doni kialon.

### 5. Aliaj vortoj kun la silabo "ik"

Pli ol ducent vortoj en Esperanto finiĝas per la silabo "ik" 14., kaj ilia etimologio estas tre diversa. Ne sciante la devenon de tiuj vortoj, oni ne povas esti certa, ĉu "ik" estas morfemo en la etimo aŭ ĉu ĝi apartenas al alia sufikso aŭ al la radiko mem. En tiuj kazoj ĝi devas esti neapartigebla silabo de la Esperanta radiko 15. Jen kelkaj ekzemploj: diptiko (h. ptiĥos); hemistiko (h. stiĥos); mastiko (h. mastiĥé); testiko (l. -iculus); kaŭstiko (l. -icus); artifiko (l. gen. fic-); radiko (l. gen. radic-); kompliki (l. plicare); abdiki (l. dicare); sputniko (R. -niko).

### 6. Fakultativa uzo de "ik" en Esperantaj vortoj

Ankoraŭ unu demando temas pri la fakultativa uzo de "ik" en paroj kun identa signifo kiel la sekvaj: aŭtentika/aŭtenta Z; ratifiki/ratifi; ekzotika/ekzota. Kiel estas eble starigi regulon por elimini "ik" kiel balastan silabon sen ŝanĝo de signifo? Ankoraŭfoje oni devas informiĝi pri la etimologio; Rimarko, tamen, ke en la samdevena paro "eroto/erotiko" la difinoj en PIV diferencas.16.

Bernard GOLDEN  
Direktoro de la Sekcio pri  
Ĝenerala Vortaro

.../...

## Notoj

1. Membroj de la Akademio de Esperanto, kiuj ĝis nun (re)aliĝis al la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro, estas: Gerrit BERVELING, C.O. KISELMAN, Violin OLJANOV, William SOLZBACHER, Perla MARTINELLI, kaj Jean THIERRY.
2. Ch.VERAX. Enciklopedia Vortareto Esperanta. Paris:Hachette,1910. 249 pĝ.
3. Eugen WÜSTER. Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana.Leipzig. Ferdinand Hirt;1923; 576pĝ.(partoj 1-4)
4. Geraldo MATTOS. Vortanalizo en Esperanto.Pĝ.169-204 en: Centjara Esperanto. Chapecó(Brazilo):Fonto;1987.237 pĝ.
5. Miroslav MALOVEC. Gramatiko de Esperanto; Třebíč (Ĉeĥoslovakio). 1988.102 pĝ.
6. Jan WERNER. Terminologia Kurso. Roudnice nad Labem (Ĉeĥoslovakio). Sdružený klub ROH; 1986.88pĝ.
7. R.CORSETTI,M. LA TORRE,N.VESSELLA. Lingua Esperanto. Corso di base. Pisa:Edistudio;1984.302 pĝ.
8. Akiko NAGATA. Fakvortoj Lingvikaj. Multobligita.1988. 3pĝ.
9. Olav REIERSØL. Principoj por elekto de matematikaj kaj stokastikaj terminoj en Esperanto. Statistical memoirs,Institute of Mathematics,University of Oslo,n-ro 2.1985. 40pĝ.  
Olav REIERSØL. Matematika kaj stokastika terminaro Esperanta. Statistical memoirs,Institute of Mathematic,Univers.of Oslo N°1.1987. 116pĝ.
10. Akiko NAGATA. Lingvikaj vortoj de esperanto el la vidpunkto de japanlingvano. Pĝ 479-484 en Serta Gratulatoria in honorem Juan Regulo. La Laguna (Hispanio):Universidad de La Laguna; 1987. Vol.II-Esperantismo.790 pĝ.
11. Bernard GOLDEN. La etimologio kaj ortografio de "numismatiko". Bulgara Esperantisto. 1988. 57(7-8):10.
12. Bernard GOLDEN. Retroformado de radikoj en Esperanto finiĝantaj per la silabo "ik". Dia Regno. 1989.11 (699):69 kaj 12(700).
13. Karolo PIC. Evoluo de Esperanto. Pĝ. 287-298 en: Li kaj Ni. Antverpeno/La Laguna: TK Stafeto; 1985. 512 pĝ.
14. Klaus SCHLÜTER. Inversa Vortaro de Esperanto. Nürnberg:Ludwig Pickel; 1972. 35 pĝ.
15. Bernard GOLDEN. La balasta paronima adjektivo "tragika". La Gazeto. 1988; 1(19):30-31.
16. Bernard GOLDEN. Komentoj pri kelkaj lingvaj problemoj. Medicina Internacia Revuo. 1985: 4 (44):144-145.  
Bernard GOLDEN. Dornhava temo (la ik-enigmo). Dia Regno.1987. II/12: 2850.

Komentoj pri la proponita projekto estos utilaj por plua esplorado.

\*

\* \*

SINCERAJN BONDEZIROJN DE LA REDAKCIO AL ĈIUJ GELEGANTOJ DE "LA LETERO DE L'AKADEMIO" OKAZE DE LA NOVA JARO!

## DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ

D.- Ĉu efektive, se temas pri virino, "sekretario" estas tiu virino, kiu plenumas funkcion en asocio, dum "sekretariino" profesie sekretarias? (S-ino Louise Marin).

R.- Jen demando, kiu vokas tre nuancitan respondon. Cetere, se temas pri viro, ĉu estus du esprimoj paralelaj? Efektive, de kelkaj jaroj pro la konata socia evoluo en iuj landoj ekzistas tendenco, laŭ kiu forviŝiĝus la esprimoj de nocioj rilatantaj la sekson, se tiuj ne estas gravaj en la koncerna kunteksto. Paralele kaj paradokse oni konstatas, ke pli ol unu samideano male serĉas rimedon paroli en egaleco pri ambaŭ seksoj, kiam tiu ĉi gravas. Verŝajne tiu tendenco ne estas tutmonda kaj koncernas nur kelkajn landojn...

Ĉu iu estas viro aŭ virino, ne estas grava elemento, se necesas trovi laborkapablan samideanon por posteno de sekretario, prezidanto aŭ kasisto. Tiel oni legas "F-ino aŭ S-ino X," Prezidanto de la Esperanto-Asocio". Ne ĝenas, eĉ se iuj konsideras, ke tio spitas la gramatikon! (Tamen, se mankas la indikoj f-ino aŭ s-ino kaj se vi deziras skribi leteron aŭ telefoni al la persono, treege povas ĝeni tia spitado de la gramatiko! J.T.)

Aliflanke iuj estas tre tikliĝemaj, se ili legas ekzemple en statuto (ke pri rajto de membro) "li" estas reelektebla". Ili tuj ekkrias: "Sed kio, se temas pri ŝi?" Ili volus legi "ŝi/li" aŭ "li/ŝi", aŭ prefere iun novspece neŭtran pronomon tamen diferencon de "ĝi"...

Tamen se rigardi la aferon pure gramatike, oni ĉiam devus uzi la sufikson -ino... Kaj pri "li" ekzistas memorinda Lingva Respondo de Zamenhof, laŭ kiu oni ja diras "li" pro kutimo en multaj lingvoj; kio estas akceptinda, eĉ kiam logike oni devus diri "ĝi". Konkludo plaĉa al iuj, malplaĉa al aliaj!...

(Sed ĉar "ĝi" en la uzado akiris la sencon "senseksa") kaj "li" tre ofte estas uzata por aludi personon indiferente ĉu temas pri viro aŭ virino, iuj por aludi pri viro proponis la formon "hi" el la angla "he" same kiel "ŝi" estas eltirita el "she".

Sed oni ne diru, ke la Akademio proponas aŭ rekomendas tion fari! Krom la tradicia kaj internacia uzateco de "li", laŭ la Fundamento kaj tradicio restas oficialaj ĝis nun la ĉiama uzado de -ino kaj la neuzata kvankam logika uzo de "ĝi"! (A.A.)

N.de la R.- Oni povas demandi sin, ĉu tiu tendenco ne estas nura influo de la angla lingvo en Esperanton? (J.T.).

---

" La Letero de l' Akademio de Esperanto", trimestra informa letero eldonita de "La Amikoj de l' Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet F- 75017 PARIS- Francio  
Direktoro de la publikaĵo: André BOURDEAUX Redaktoro: Jean THIERRY Presejo: Coconnier, Sablé s/ Sarthe- C.P.P.P. n-ro 69710 1 n-ro: 40FRF Jara abono: 120FRF. Pagebla ĉe kontoj:  
Banko: Crédit Lyonnais n-ro 7090F Poŝtĉekkonto: 735 27 B Paris  
U.E.A.: Poŝta Banko Nederlando 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag): precizigi "por la Amikoj de l' Akademio de Esperanto".  
Peranto por tuta Nordo: S-ro Jan SOSNIECKI, Dalslandsgade 8, M201 DK 2300 Kopenhago S. Danio  
Poŝta ĝiro : 8 55 56 72  
Peranto por tuta Azio: S-ro UMEDA Yosimi, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, TOKYO 153-Japanio  
Peranto por Meksiko: S-ro Enrique LEMUS RODRIGUEZ, Insurgentes Sur, 3493; villa Ilimpica edif. 27-001 14020 Tlalpan, México DF Meksiko.